# Plejlastaj sukcesoj ĉe la ILEI-konferenco!

2014-07-03  Raportas: LKK de la Konferenco kaj Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI.

Pri la 47a Konferenco de ILEI en Montevideo, Urugvajo, 19an ĝis 25a de Julio 2014

La 4an de Junio 2014 la Prezidento de Urugvajo, Sinjoro José Mujica, sendis leteron al nia Loka Konferenca Komitato; en ĝi li deklaras, ke nia 47ª Konferenco estas “de nacia intereso”.

La 3an de Julio 2014 la direktorino de la regiona UNESKO-oficejo pri sciencoj por Sud-Ameriko kaj Karibio kaj de la UNESKO-oficejo por Urugvajo, Paragvajo kaj Argentino, kaj MERCOSUR, Sinjorino Lidia Brito anoncis, ke ŝi partoprenos la solenan malfermon de nia Konferenco la 21an de Julio je la 10ª horo. Plie ŝi kontribuos per parolado.






Tiu grava evento okazos en la Parlamenta Domo, kie la Ĝenerala Konferenco de UNESKO aprobis la unuan Rezolucion favoran al Esperanto en la jaro 1954 (vidu Jarlibron 2013, p 8)

Belega bunta konferenca afiŝo ekzistas en la hispana lingvo.

Ĝis la 3a de Julio 2014 aliĝis al la Konferenco 64 personoj el 21 landoj.

Plusendas kaj pretigis la ĉi tiun PDF-version:

Stefan MacGill, Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.